Internacia Tago de la Viroj

Esti viro estas:

- la sento de la fizika doloro de pilkfrapo sur... la pilkojn;

- la turmento uzi kompleton kaj kravaton eĉ en la somero;

- la torturo razi sin ĉiutage;

- la despero kaŭzita de la strikta subpantalono;

- la frenezigo, kiu konsistas el la ŝajnigo de preteratento antaŭ ino sen mamzono;

- la malespero rezisti je okulumado de belaj gamboj en jupeto;

- iri al plaĝo kun la edzino kaj rezisti je okulumado al virinego, kiu kuŝas apude;

- vivi en konstanta risko interbatali kun alia viro;

- kontroli la rostilon en la rostejo, en la semajnfino, dum ĉiuj amuziĝas;

- ĉiam havi la devon solvi la aŭtomobilajn problemojn;

- nepre ĉiam atenti pri ŝia vestaĵo;

- nepre ĉiam atenti, ĉu ŝi ŝanĝis la parfumon;

- nepre atenti, ĉu ŝi ŝanĝis la harfarbon de la koloro 713 al la koloro 731;

- nepre atenti, ĉu ŝi tondigis la hararon, eĉ se nur unu metrocentonon;

- neniam atenti, se ŝi gajnis haŭtgrason;

- neniam diri ke ŝi grasiĝis, eĉ se tio estas tre rimarkinda;

- deflankigi la okulojn de la sekretariino, kiu ŝajnigas malatenton lasante la bluzon aperta ĝis la umbiliko;

- ĉiam montriĝi kiel seksuma atleto;

- ne montri suspekton, ke ŝi, per tiom da spiroj kaj ĝemado, nur incitas la kunulon;

- post aŭskulto de "ne", sin turni flanken, rezignita, kaj dormi, malgraŭ la volo rompi la tutan ĉambron kaj skandali laŭte;

- aŭskulti de ŝi, ke ŝi ne havas vestaĵojn, kiam la vero estas manko de spaco por stoki pli da vestaĵoj;

- tagmanĝi dimanĉe ĉe la bopatroj, diskuti politikon kun tiu faŝista maljunulo, bone zorgi pri la nevoj, sin kontroli por ne rigardi al la mamdekolto de ŝia fratino, kaj ne pugnobati ŝian fraton, kiu, la fiulo!, ĉiam petas pruntmonon;

... uff! kaj iŝi eĉ kuraĝas diri, ke esti viro estas facila, nur pro tio ke ni ne havas menstruon!

- ahh! mi preskaŭ forgesis... pri la nedirebla doloro, kiu okazas al tiu, kiu uzas pantalonan zipon kaj, pro malatento, enŝovas la kac-haŭton en la zipon... uahhh... fek!... fek!... kaj tuj poste venas la dua doloro... por demeti la ilon el la zipo...

Ĉu do ni, viroj, ne meritas la estiĝon de

Internacia Tago de la Viroj,

pro tiom da turmentoj en niaj vivoj?